

Heinrich Heine,

[En nokta sonĝo vidis mi mem min]

*tradukita de Manfred Retzlaff*

En nokta sonĝo vidis mi mem min,  
 En festa nigra frak' kaj silka vesto,  
 Vestita pompe kiel por la festo,  
 Kontraŭe staris mia karulin'.

Kaj diris mi petante pri pardon':  
 „Gratulon, se vi estas fianĉin'!“  
 Sed preskaŭ torde ĝi sufokis min.  
 La longa, ĝentileca, frida son'.

Subite larmoj pluve elverŝiĝis  
 El la okuloj de la karulin'  
 Kaj preskaŭ ŝia bildo disfluigis.

Okuloj dolĉaj, vi amsteloj piaj,  
 Ja ofte estas vi trompintaj min,  
 Mi kredas tamen vin en sonĝoj miaj.

*Traduko de la Germana poemo “[Im nächtgen Traum hab ich mich selbst geschaut]” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-124-1a / Arg-688-1389 (2012-12-02 16:26:58)*